



C/. Montseny, 5, 1-er  
E-08208 SABADELL

Ptge. Gaudí, 1, 3-er  
E-08221 TERRASSA

Nº 16 - Kvara aperjaro. Monatria informilo. Somere de 1990.

POST EKSPOZICIO, ENKETO KAJ PRELEGO KUN PROVLECIONO.



Parto de la ekspozicio. Foto Torné.

el la abunda materialo de la KAE- samideano Josep Cervelló, el Terrassa.

Motive de tiu tradicia festo, loka ĵurnalo publikigis tutan paĝon informantan pri la Zamenhofa kreaĵo, kune kun ĉudirekta invitmesaĝo Esperanta-Katalunalingva. Dum la ekspozicio, kiun oficiale inaŭguris la KAE-prezidanto s-ano Manau kaj la loka magistratano s-ro Aguilar - tiu lasta finante sian paroladon per stimulaĵoj en Esperanto - , oni vaste distribuis varb-

La 2-an kaj 3-an de junio nun-jara, kadre de tradicia festo kvartala, la Sabadell-a Delegacio de la Katalun-teritoria organizacio "Kultura Asocio Esperantista (=KAE) ekspoziciis, kune kun aro da selektitaj Esperanto-verkoj, alire buntan kaj bele aranĝitan kolekton da diversnaciaj glumarkoj pri la Internacia Lingvo,

triptikojn rekomendantajn la Korespondan KAE-Kurson.



S-ano Aragay prelegante. Foto Galofré.

Rezulte de la priorganizaj kontaktoj kun la kulturaj aŭtoritatoj tiukvartalaj, oni favorakondiĉe atingis, ke la UEA-Komitatano s-ano Salvador Aragay i Galbany, faris prelegon pri Esperanto, inklude kun provleciono, al 85 gelernantoj de la loka lernejo "Maragall", la 6-an de la sama monato. Du tagojn antaŭe, la Sabadell-

aj KAE-respondeculoj estis enketacele distribuintaj Esperantan materialon kun demando al tiu lernejo, danke al kio ties gelernantoj povis skribe esprimi sian opinion pri la Internacia Lingvo. Plie, estas jam formale interkonsentite, ke en la venonta septembro s-ano Aragay ree prelegos pri la sama temo en alia lernejo de la urbo Sabadell.

La ekspozicion kaj la prelegon en la lernejo favore menciis, krom la radio kaj televido lokaj, ankaŭ la ĵurnalo "Diari de Sabadell", en kies filatela rubriko aperis, sub la titolo "Vinjetofilio", simpatie objektiva recenzo de ĝia redaktoro BAF.

### KAE-ANO REPREZENTAS URBAN DISTRIKTON

S-ano Josep M<sup>a</sup> Galofré i Domingo estas ĵus nomumita membro de la "Municipa Konsilio pri Kulturo" de la urbo Sabadell, reprezentante de ties II-a distrikto, kie troviĝas la sidejo de la "Kultura Asocio Esperantista".

### ESPERANTO-POSTSTAMPO JAM KONCESIITA

Dum la 50-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta la nunan julion en la Institucio "Centro Borĵa" de Sant Cugat del Vallès (Katalunujo), la tiea poŝto oficiale uzos poŝtstampilon rilatan al tiu ŝtata Esperanto-Kongreso

## Evoluo de la Ĉiutaga Esperanto

Bernard Golden

Leginte la artikolon "Ĉiutaga Esperanto, ĉu eblas?" de Amador Díaz (KAE-Informilo 14 (1990), Pĝ. 10-11 kaj 15, pĝ. 2), mi konsterniĝis pro la supraĵa traktado de la temo. La prezento de la diversaj niveloj de lingvouzo estas ne nur nebula sed ankaŭ erara. Unue, Díaz ne kapablas objektive diferencigi ĉiutagajn esprimojn disde kontraŭgramatikaj vortformoj sed ĵetas ĉiujn en la saman korbon. Esperanto ja havas abundon da ĉiutagaj vortoj kaj esprimoj, t.e. leksikaj elementoj apartenantaj al la komunuza lingvo, kiuj semantike rilatas al lingvaj elementoj en la beletro kaj sur la faka nivelo. Apud tiuj idioj ekzistas slangaj esprimoj uzataj de specifaj grupoj (junuloj, metiistoj ks.). Ilia lingvaĵo estas relative efemera, ŝanĝiĝas en ĉiu generacio kaj manifestas variaĵojn laŭ geografiaj regionoj. Ankoraŭ unu kategorio de ĉiutagaj vortoj estas esperantismoj, kiuj rilatas al la subkulturo de la Esperanta lingvokomunumo. Menciindas ankaŭ tiu grupo, kiu enhavas vortojn kaj esprimojn portantajn la leksikografiajn etiketojn "vulgara" kaj "triviala".

Se oni diligente trakribas librojn, revuojn kaj registraĵojn de la parolata lingvo en spontanaj konversacioj, estas eble kompili tutan vortaron spegulantan la neliteraturan, nebeletran aspekton de Esperanto. Kelkaj pioniraj provoj kolekti tiun materialon jam estis faritaj, eĉ publikigitaj, sed bedaŭrinde Díaz tute ne scias pri ili. La sola verko, kiun li mencias, estas la erotika poemaro Sekretaj Sonetoj, publikigita en 1932 de K. Kalocsay sub la pseudonimo Peter Peneter. Ne nur tiu fama literaturisto faris provon provizi la leksikon de Esperanto per skatologiaj vortoj rilatantaj al sekso kaj ekskrementado, kiel mi montros ĉi-sube.

Eble la unua provo listigi la diversajn komponantojn de la ĉiutaga Esperanto troviĝas en Klasifiko de Esperantaj Temoj (1950) de M.C. Butler. Inter ili estas slango, dialektoj, profesia, metia kaj faka ĵargonoj, lingvaĵo de infanoj, drinkuloj, lispantoj ks. Du aŭtoroj, kiuj detale pritraktas la problemon de diversaj niveloj de lingvouzo, kaj kiel prezenti ilin en Esperanto, estas Edmond Privat en sia Esprimo de Sentoj en Esperanto (1957) kaj F. Faulhaber en Esperanta Mozaiko (1966). En 1977 ankoraŭ unu esperantologo, d-ro István Szerdahelyi, publikigis la rezultojn de sia esploro de la slango de TEJO-anoj. Jen kiel li prezentas la demandon.

"...ĉu la stiltavoliĝo de Esperanto okazas nur laŭ opaj verkistoj en la kadroj de la beletristiko? Ĉu ne ekzistas krome ankaŭ ĵurnalistika, scienca, popular-sciencia stiloj? Ĉu ne el-

formiĝis en Esperanto ia diferenco inter la skribakaj parola stilo? Ĉu ne estas en Esperanto ĉiutaga parola stilo, familiara, oficiala ktp. stiloj, ĵargonoj, frazeologio? Ĉu ekzistas aŭ povas esti en Esperanto infana lingvo?" Dum la 26-a TEJO-Kongreso en Graz (1970), d-ro Szerdahelyi rimarkis, ke la junularo havas specifan lingvaĵon, kiu diferencas per rimarkeblaj trajtoj de ĉiuj aliaj stiloj.

En la 1980-aj jaroj Leif Nordenstorm komencis publikigi en la skandinavia junulara revueto ktp materialon por Slanga Vortaro de Esperanto, kaj en 1985 Michel Challulau aperigis en Laŭte! sian artikolon "Kiel sakri en Esperanto" kun multaj ekzemploj de sukplenaĵoj sakraĵoj. Daŭrigis lian laboron Renato Corsetti, kies kompilaĵo Knedu Min Sinjorino!: tabuaj kaj insultaj esprimoj en esperanto! estis eldonitaj en 1987. Ĝi enhavas insultojn, sakrojn, evitesprimojn, interjekciojn, onomatopeojn, tabuajn vortojn, metaforojn kaj slangajojn. Corsetti substrekas la gravecon de efektiva uzo de la esprimoj.

"Ŝajnas al mi ke estas tempo doni pli da graveco al la parolantoj kiel oni faras en nacilingvaj vortaroj ol al la proponoj de verkistoj.

Pro tio mi notis per \* ("efektive uzata") ĉiun esprimon, kiun mi per miaj propaj oreloj aŭdis de almenaŭ du parolantoj en normala parolado (temas pri vere minimuma postulo). Ĉio cetera estas rigardinda kiel propono eĉ se ĝi venas de Zamenhof mem." (substrekado de Corsetti).

Multe pli elokventaj estas la pledoj de literaturistoj favore al la evoluo de la konversacia stilo en Esperanto. La argumentoj de Karolo Piĉ troviĝas en "Periferiaĵoj ĝenroj en Esperanto", publikigita en Oomoto en 1978, kaj en lia eseo "La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj", kiu estas aldonita al lia romano La Litomiŝla Tombejo (1981). Lastatempe Josef Rumler, la korifeo de la Praga Skolo, marteladis la punkton, ke estas necese evoluigi plurajn stilojn kaj substilojn en Esperanto. En sia eseo "Abunde kaj redunde" (1986) li listigas la komun(uz)an, fakan kaj art(literatur)an stilojn; la komun(uz)a havas du substilojn: la konversacian kaj la publicistan.

Tre grava parto de la ĉiutaga, konversacia lingvo en Esperantujo estas vortoj kaj esprimoj por apartaĵoj de la Esperanta subkulturo. Ĝuste tiaj leksikaj elementoj ne estas plene kompreneblaj por eksteruloj, nek por nespertaj esperantistoj. La temo estas pritraktita kun multaj ilustraĵoj fare de Aleksandr Melnikov en sia studaĵo "Specifeco de fonaj scioj de la personoj uzantaj Esperanton" (1985).

Devas esti evidente, ke la problemoj rilate evoluigon de ĉiutaga Esperanto jam ricevis la atenton de pluraj elstaraj esperantistoj, kiuj analizis ilin pli profunde ol faris Ama-



dor Díaz en sia artikolo. Por ne skribi diletantece pri la temo en la estonteco, estas konsilinde, ke Díaz unue trastudu la cititajn verkojn.

Aprilo 1990

Bernard GOLDEN

Damjanich u. 1/C. I. 8.

H-8200 Veszprém (Hungarujo)

### INTERVJUO AL PRESTIĜA S-ANO, VICPREZIDANTO EN LA UEA-ESTRARO

La 21-an de marto nunjara, okaze de vizito farita de la Pola s-ano Roman Dobrzynski, vicprezidanto de la Universala Esperanto-Asocio (=UEA), en la sidejo de la Barcelona Esperanto-Centro, ties prezidanto s-ro Salvador Aragay Galbany, kiu krome estas, reprezente de Hispanujo, ankaŭ komitatano de la menciita Universala Esperanto-Asocio, intervjuis sian Estraran kolegon. Jen liaj opinioj:

#### **A). ĈU LA PROJEKTO PRI STARIGO DE TUTMONDA ESPERANTO-CENTRO EN BĴALISTOKO, NASKIĜURBO DE ZAMENHOF, MULTE PROGRESAS?**

D). La aktualaj ekonomiaj ŝanĝoj en Pollando malebligas engaĝiĝon de la ŝtato en la realigo de la projekto. Aliflanke, respektive de la monda Esperantistaro estis malgranda. La Fondumo Zamenhof disponas momente tro malmultan sumon por komenci la konstruadon. Dume estas rezervita la placo en la centro de la urbo Bjalistoko. Mi timas, ke la kapitalismaj reguloj, kiuj revenis al Pollando, entute eliminis nian projekton, se ni ne sukcesos rapide kolekti konsiderindan sumon. Ĉiukaze mi devas substreki, ke la ideo pri Zamenhof-Centro impulsis la Movadon en tiu urbo, kaj vekis intereson de aliaj organizaĵoj. Ekzemple antaŭ nelonge formuliĝis en Bjalistoko filio de Internacia Scienca Akademio de San Marino; en Medicina Akademio kreiĝas internacia centro de akupunturo; baldaŭ okazos sciencaj kontaktoj de la loka universitato kun eksterlandaj altgradaj lernejoj surbaze de Esperanto.

#### **A). KIUJ ESTAS LA LASTAJ NOVAĴOJ DE LA 75-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN KUBO?**

D). La preparoj iras glate. La kongreso havos imponan kaj riĉan programon. Bedaŭrinde, relative malmultaj Esperantistoj aliĝas al la kongreso, kio estas iom nekomprenebla, ĉar Havano estas tre atrakcia loko ankaŭ laŭ turisma vidpunkto.

#### **A). KION VI OPINIAS PRI LA LASTA VERKO ELDONITA DE LA BARCELONA ESPERANTO-CENTRO, NOME "ESPERANTO EN PROSPEKTIVO", VERKITA DE S-RO GIORDANO MOYA ESCAYOLA?**

D). Mi konsideras ĝin eminenta verko. La aŭtoro sukcesis ligi nian ideon kun la precipaj problemoj de la nuntempa mondo; li

donas al Esperanto novan dimension kaj malfermas novan perspektivon al nia Movado.

**A). ĈU OKAZOS EN VALENCIO, LA JARON 1993, LA 78-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO?**

D). Estas mia granda deziro, ke la 78-a Universala Kongreso de Esperanto okazu en Valencio. Laŭ mia opinio la Estraro de UEA havas favoran teniĝon al la propono, tial mi kredas, ke ni renkontiĝos en la "Oranĝejo de Eŭropo", la jaron 1993.

**A). ĈU LA NUNA POLITIKA SANGO EN LA ORIENTA EŬROPO IEL INFLUOS ENKONDUKI IUN AJN MODIFOJN EN LA STRATEGIA PLANO DE UEA?**

D). La strategia plano de UEA estas tre ampleksa kaj multfaceta, do ĝiaj sugestoj estas facile adapteblaj al la ŝanĝiĝintaj orient-Eŭropaj landoj. La ŝanĝoj estas ĝenerale pozitivaj, ili donas al la Esperantistoj pli da libero agi, kontakti la ceteran mondon, vojaĝi ktp. Sed samtempe la orient-Eŭropanoj ekstaras antaŭ pli grandaj ekonomiaj problemoj. La merkata ekonomio postulas pli da profesia streĉo, do ĝi limigas la tempon de la Esperantistoj por la Movada agado. Krome, ni ne forgesu, ke antaŭe Esperantistoj sukcesis profiti de la ŝtataj subvencioj, kiuj estas precipa fonto de la disvastiĝo de Esperanto en orienta Eŭropo. Nun la subvencioj malaperis, la landaj asocioj devas trovi novajn fontojn. Mi kredas, ke la Movado sukcesos adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj.

**A). EN LA NUNA JARO NI FESTOS LA 50-AN HISPANAN KONGRESON DE ESPERANTO EN SANT CUGAT DEL VALLÈS, URBETO APUDA AL BARCELONO, ĈU VI POVOS ĈEESTI ĜIN?**

D). Bedaŭrinde la Hispana Esperanto-Kongreso okazos samtempe kun la Universala Kongreso de Esperanto en Kubo, kaj mi devas vojaĝi al Havano pro la funkcio en la Estraro de UEA.

**A). KAJ FINE, NIA TRADICIA DEMANDO AL NIAJ INTERVJUATOJ: POR VI ESPERANTO ESTAS, ĈU LINGVO KUN INTERNA IDEO, ĈU IDEO KUN INTERNA LINGVO, AŬ ĈU NURA LINGVO?**

D). La lingvo kun interna ideo!

**ESPERANTISTA RENDEVUEJO TRE PROKSIMA AL BARCELONO**

Diversurbaj ge-Esperantistoj, daŭre rendevuantaj la unuan dimanĉon de ĉiu monato ĉe la inter pinoj situanta kampdomo de gesamideanoj Deltell, en la urbeto VALLDOREIX, invitas ĉiujn praktik(ig)i Esperanton. Por tiuj, kiuj deziras tagmanĝi en simpla, agrabla kaj amikeca etoso, oni tie kuiras ŝelhavan rizon en vegetala "paella", je modera prezo (nur ĝia kosto). Pliajn informojn tiurilatajn havigas: s-ano Jaume Deltell, tel. (93) 218 43 34, aŭ s-anino Anna Cardó, tel. (93) 339 05 47,

## ALVOKO AL CIUJ ESPERANTO-KURSGVIDANTOJ



Cele kontribui al la revigligo de la tut-ŝtata Esperanto-Movado, precipe de ties junulara branĉo, s-anino Terezino Lladós de Mimó, veterana Esperantistino en Sabadell, decidis ĉiujare premi, per librodonaco, tiujn diversurbajn plej diligentajn glerantojn nialandajn, kiuj plej sukcese asimilis la Esperanto-lecionojn.

La kursgvidantoj povos elekti, por la supozeble unu aŭ du plej distingindaj glerantoj el ilia klaso, superan gramatikon aŭ literaturan libron, respektive verkitan aŭ tradukitan de la prestiĝa Esperantologo Luiso Mimó Espinalt, bedaŭrata edzo de s-anino Terezino Lladós, kiu liamemore faktigas tiun librodonacon. Por peto de la senpage riceveblaj Esperanto-libroj, ĉiu kursgvidanto bonavole skribu, indikante la verkon elektitan, ĉu gramatikan aŭ literaturan, rekte al ŝia peranto: s-ano Luis Serrano Pérez, C/. Font Nova, 32. E-08202 SABADELL.

## ESPERANTO EN PROSPEKTIVO

Ĝi estas tre interesa, 151-paĝa belaspekte bindita libro el la plumo de nia pacista KAE-ano Giordano Moya Escayola. La verkon, kiu prezas 950 pesetojn, eldonis la Barcelona Esperanto-Centro, ĉe kies adreso: C/. Carreras Candi, 34. E-08028 Barcelono, oni povas ĝin mendi, samtempe transpagante ĝian koston per poŝtmandato aŭ ĉeko.

Kiel koncizan prezenton de la menciita libro, nome "Esperanto en Prospektivo", ni kopie aldonas jenan eksplikon: PROSPEKTIVO laŭ la Plena Ilustrita Vortaro (=PIV), estas: "Scienco pri la kaŭzoj sciencaj, teknikaj, ekonomikaj kaj sociaj, kiuj akcelas la evoluon de la mondo, kaj pri la eventualaj situacioj, kiujn ili povas estigi". Sub tiu moto, la aŭtoro Giordano Moya Escayola, verkinto de la "Homa Vivaventuro", analizas la penson de L.L. Zamenhof kaj ties idearon en rilato al la Esperantista Movado, kaj konceptas ĝin kiel la portanton de ideo-forto kapabla ŝanĝi nian aktualan civilizacion.

En la kriza nuntempo de la atom-energio, en kiu la socialaj ideologioj, plejgrandaparte hereditaj de la pasinta deknaŭa jarcento, jam atingis siajn kapablajn eblaĵojn, en mensa kaoso pro la disfalo de la kutima moralò, la aŭtoro montras kiel la spirito entenata en la "Interna Ideo" de Esperanto povas generi novan nomaran civilizacion en unueco, paco kaj libero.

**ABONU LA KAE-INFORMILON. VIDU NOTON TIURILATAN SUR PAĜO N<sup>o</sup> 8.**



aperanta KAE-periodaĵo estas eksklude redaktata surbaze de la 16-regula Fundamenta gramatiko de D-ro Zamenhof. Ĝia jarabono, kun kvar garantiataj numeroj, kostas nur 500 pesetojn, kiun monsumon bonvole sendu per trastrekita ĉeko aŭ poŝtmandato al la jena adreso: V. Hernández Llusera, Av. Onze de Setembro, 59. E-08208 SABADELL.

## **AKTUALIGITA KATALOGO DE LA HEF-LIBROSERVO**

Tiu ĉi 24-paĝa regule eldonata libro-katalogo diverstema enhavas, laŭalfabete ordigite, krom detala listo kun prezoj de la titoloj disponeblaj en la momento de ĝia redaktado, ankaŭ stokon da pri-Esperantaj filatelaĵoj, glumarkoj, emblemoj, postkarto ktp. Interesatoj ricevi senpagan ekzempleron de tiu valorata katalogo, tuj ĝin petu poŝtkarte al la: "Libroservo de la Hispana Esperanto-Federacio", Apartado 119. 47080 VALLADOLID.

## **8-A ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO**

Ĝi okazos, kune kun la 1-a Internacia Renkontiĝo, en Torrox (Malago), de la 7-a ĝis la 14-a de oktobro 1990. Loĝigo kaj tri manĝoj en tre bela Restadejo apud la plaĝo, en 2-, 3-, 4-, 5-, 6- kaj 7-litaj ĉambroj, ĉiuj kun necesejo kaj duŝejo. Venu kaj feriu en Torrox, vilaĝo de la Suna Marbordo, kun, laŭdire, la plej bona klimato en Eŭropo. Prezo por la tuta semajno: 14.000 pesetoj. Informojn/ Mendojn/ Pagojn ĉe Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Poŝtkesto 864. E-29080 MALAGA.

Samadrese oni ofertas la Diskon LP (longa daŭro) KOSMO- INFANO de la Malaga muzikisto SOLO, kun modernaj kaj belaj kanzonoj en Esperanto. Surdiskigita per nova digitala sono-sistemo DAT, kiu ebligas la plej bonan sonon. Prezo: 1.200 pesetoj (Disko + teksto + sendo)

## **ESPERANTISTO REE RICEVINTA GRAVAN PREMION**

Motive de la 132-a artkonkurso "Floraj Ludoj de la regurbo Barcelono", okazinta la 10-an de majo nunjara, estis liverata la premio "Violo el Oro kaj Arĝento", dotita per 300.000 pesetoj, al la Katalunalingva poemo "Procés Obert" (=Proceso aperta), kies aŭtoro estas s-ano Gabriel Mora i Arana, prestiĝa Esperantisto en Manresa (Barcelono). Pro tio, ke li trifoje atingis ordinaran premion (du "violetojn" kaj unu "naturan floron"), s-ano Mora i Arana merite rajtis ricevi la majstreccan titolon "Gai Saber" (=Gaja Scio). Laŭ la Katalunalingva nomindiko "Gai Saber" estis konata, en la mezepoko, la poezia arto.



## IEL EKSKUZANTE PRETERVIDITAJN MALGUSTAĴOJN

La Redakcio de la KAE-informilo petas pardonon (ne pardon-petas kiel erare indikas la PIV!) pro la neakuzativigo de la kapvortoj VOJAGO kaj RESTADO, troviĝantaj sur paĝo 11 de la laste aperinta KAE-informilo n<sup>o</sup> 15. Bedaŭrinde foje okazas, eĉ al veteranaj Esperantistoj, ke dum vigla konversacio, aŭ en urĝa tajpado ili preterlasas la gramatikan finaĵon, t.e., la literon n koncernantan la akuzativon, kion cetere, ni indulge ne nomas eraro, sed manko de atento.

Kiel kuriozaĵon, jen du tiurilataj anekdotoj, kies protagonistoj estis du tre prestiĝaj geesperantistoj Katalunaj, kies lingva nivelo ĝenerale estis/as senripoĉa: Motive de festo en omaĝo al daŭre aktiva samideano, nun loĝanta en urbo de nord-Eŭropa lando, la tieaj Esperanto-klubanoj regalis ŝin per arta, bongusta kuko, kiun ornamis memoriga, tre videbla litero n. Feliĉe, tiun amikece spritan aludon ĉiuj, precipe ŝi, akceptis kun komprenema tolero kaj ege gaja humoro.

Karmemora, lingve tre sperta iama kursgvidanto en la Kataluna regurbo, foje, fininte sian Esperanto-klason, tuj rapidis grandalitere skribi per kreto sur la tabulo: NE FORGESU LA AKUZATIVO!

### KVITANCE AL LA ALTRUISMA KONTRIBUO DE:

María Pi Maynar, en Tenerifo, per ... 5.000 pesetoj  
Rodolfo Canet Marín, en Alikanto per .. 500 "

La respondeculo de tiu ĉi informilo, nome de la KAE-estraro, esprimas sian dankon al tiuj gesamideanoj pro ilia bonvola mondonaco.

### FILATELO KAJ ESPERANTO

En la unua numero de la monatdua filatela revuo "World Collector", Apartado 1734 E-48080 Bilbao, estas publikigita Kastilialingva raporto, subskribita de s-ro Santiago Martín Ralea, pri la Esperanto-poŝtmarkoj ĝis nun oficiale emisiitaj en la tuta mondo. Kiel sciate, la filatela temo "ESPERANTO" nuntempe konsistas entute, se ni ne miskalkulis, el 49 poŝtmarkoj plus kelkaj poŝtaj tutaĵoj, kiuj daŭre uzis/as por afranko jenaj nacioj: Soveta Unio, Aŭstrujo, Pollando, Ĉeĥoslovakujo, Malto, Ĉinujo, Svislando, Germanujo, Surinamo, Bulgarujo, Brazilo, Hungarujo, Kubo kaj Jugoslavujo.



## RILATE LA AKADEMIAN REZOLUCION PRI LA PARTICIPOJ

Ni volas precizigi, ke ilia tempisma apliko laŭ la 6-a Fundamenta regulo, en kiu D-ro Zamenhof eksplicite parolas pri tempoj, ne pri aspektoj, estas konstateble same malnova, multe pli facila, precipe por laboristoj, kaj nekontesteble pli logika ol la t.n. aspektisma teorio misinventita de Waringhien.

La ĝisnunaj peze longaj studoj, celantaj travigi aŭ lernigi la komplikan aspektismon, fakte nur povas malesperigi ĉiun bonafidan lernanton de Esperanto. Kontraŭe, la interpreto de la participoj laŭ la citita nete tempa 6-a Fundamenta regulo de D-ro Zamenhof pruviĝis/as science ĝusta kaj krome simple aplikebla, kion demonstris, inter aliaj, la karmemora Esperantologo Luiso Mimó Espinalt en siaj verkoj "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto" kaj ties "Komplementa Volumo" (\*)

V. Hernández Llusera

(\*) Ambaŭ verkojn oni povas aĉeti ĉe la Libroservo de HEF, Apartado 119. E-47080 VALLADOLID, aŭ ĉe Librería Serrano, C/. Font Nova, 32. E-08202 SABADELL. Tel. (93) 727 50 21.

## LIBROJ DONACE RICEVITAJ POR LA KAE-BIBLIOTEKO

Ili estas, donace de nia KAE-estrarano Salvador Aragay, la sekvaj titoloj: "La Mirinda Libro", "La Familio de Paskalo Duarte" kaj "Esperanto en Prospektivo". Krome, profesoro Rikardo Sulco, el Germanujo, plian fojon altruisme kontribuis al la riĉigo de nia KAE-Biblioteko per jenaj libroj de li verkitaj: "Palmŝtrojno de Kristiano Morgenŝterno" kaj "La Mago". Al ambaŭ samideanoj koran dankon nome de la Asocio.



## LA NUNJARA "PREMIO KLARA SILBERNIK"

Kadre de la 50-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta la nunan julion en Sant Cugat del Vallès, tiu jam tradicia Premio estos liverata al sanino Matilde de la Fuente, edzino de la prestiĝa Esperantisto Ernesto Piquero, UEA-delegito en Zaragozo.

## NEKROLOGOJ

Kun konsterno ni informiĝis pri la forpaso de filo de nia KAE-membro Adonis González Meana, apreciata Esperantisto el Gijón (Asturio). Oportune ni esprimis al li, la edzino kaj cetera familio, nian tutkoran kondolencon.

## NEKROLOGOJ

La 19-an de junio 1990, mortis 97-jara, s-ro Antoni Codina Puigarnau, bopatro de la KAE-estrarano s-ano Santiago Torné Grau. Al la geamikoj Santiago kaj ties edzino Araceli Codina Gassó, al liaj genepoj Angels kaj Antoni kaj cetera familio, ni transdonas nian plej korsentan kondolencon.

Ankaŭ kun bedaŭro ni sciigis pri la ĵusa forpaso de s-ano Boix, aktiva veterano en Manresa; kaj s-ano Rofes, konata instruisto kaj kursgvidinto en Barcelono. Al iliaj gefamilianoj la KAE-estraro esprimas sian simpatian ĉagrenon pro tiu malferliĉo.

---

### **LASTMOMENTAJ NOVAĴOJ PRI LA ESPERANTO-KONGRESO EN SANT CUGAT DEL VALLÈS**



Hodiaŭ, la 21-an de junio, en kiu dato ni liveras la originalon de tiu ĉi informilo al la pres-ejo, ni povas formale sciigi, ke jam 196 gesamideanoj enskribis sin en la 50-an Hispanan

Kongreson de Esperanto, okazontan en Sant Cugat del Vallès, de la 11-a ĝis la 16-a de julio nunjara.

Ankaŭ ni ĝojas informi niajn legantojn, ke prestiĝaj gravuloj niaregionaj akceptis esti membroj de la Honora Kongresa Komitato, inter ili, la Prezidanto de la "Generalitat" de Katalunujo, s-ro Jordi Pujol; la Urbestro de Barcelono, s-ro Pasqual Maragall; kaj la Urbestro de Sant Cugat del Vallès, s-ro Joan Aymeric.

Krome, tri institucioj, nome la "Generalitat" de Katalunujo; la Urbestro de Barcelono; kaj la Municipo de Sant Cugat del Vallès asignis konsiderindan subvencion al tiu tutŝtata Kongreso de Esperanto.

**NENIAM PLU DENTIDOLORON.** Eldonita de Esperanto-Centro Paderborno (Germanujo). Verko 236-paĝa de D-ro Snico Johano Georgo, kun formato 15X21, tradukita en Esperanton de Kliento Kristofa Joakimo, el kies prefaco ni eks-traktas jenon: "La traduko estas kreita laŭ la esplorzultoj de la ANALIZA SKOLO, kiuj tre studinde estas prezentataj en la verkoduo "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto" + "Komplementa Volumo", de Luiso Mimó Espinalt, kaj "Pledo por unueca lingvo" + "Sur la vojoj de la ANALIZA SKOLO", de profesoro Rikardo Sulco. La verko "Neniam plu dentdoloron" detale traktas pri dentokario, paradentozo kaj dentomispozicioj, ilia resanigokuracado kaj ilia prevento.




FOTO TORNÉ

respondan Esperanto-Kurson. Sur la foto, s-ano Luis Serrano, zorge de kiu glate funkciis tiu stando la tutan tagon.

### KURSO DE ESPERANTO PER KORESPONDADO

Tiu ĉi 16-leciona kurso, kun riĉa ekzercaro plus dudirekta vortareto Esperanta-Kastilialingva, kostas entute 2.500 pesetojn, kiu modera prezo inkludas specialan kasedon, kun modela Esperanta prononco en la klara voĉo de la Kroatdevena Aŭstralia Esperantisto, samideano Milan Sudec. Ĉiuj mendoj, faritaj de gesimpatiantoj dezirantaj enskribi sin en la kurson, estos traktataj nur post ilia koncerna antaŭpago, kiun oni sendu, nepre per poŝtmandato, al la: **KURSO DE ESPERANTO PER KORESPONDADO**, de la "Kultura Asocio Esperantista" (=KAE), C/. Font Nova, 32, telefono (93) 727 50 21. E-8202 SABADELL.

### PLIAN FOJON S-ANO GABRIEL MORA I ARANA ESTIS PREMIATA

Kiam estis jam tajpita la 11-a paĝo de tiu ĉi numero, ĝisvenis la ĝojiga novaĵo, ke nia Esperantista amiko, Gabriel Mora i Arana, ĵus atingis plian Katalunalingvan poempremion, nome tiun de la "Natura Floro" de la XX-aj Floraj Ludoj de la "Mistera Lumo", okazintaj en la urbo Manresa la 10-an de junio. (Vidu similan informon sur paĝo 8 de tiu ĉi informilo)

**"MOTNAIP-LUDO"** - Nova ludkartaro por praktik(ig)i Esperanton kaj samtempe amuzi sin. Partumu en tutmonda ĉampioneco pri "Motnaip-ludo". Petu kompletan informon al la "Tutmonde" - Apartat 313, E-08220 TERRASSA (Katalunujo).

La 23-an de aprilo, motive de la en Katalunujo tradicia Festo de Sankta Georgo, dum kiu oni kutimas favore preze disvendi librojn, la Sabadell-a Delegacio de la "Kultura Asocio Esperantista" starigis libro-standon en tre centra strato tiurba. La eventon oni profitis por vasta distribuado de flugfolioj propagandantaj la Kopro-